

SE IU VOLAS IRI POST MI, LI ABNEGACIU SIN

Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ Mateo 16, 21-27

En tiu tempo Jesuo komencis klarigi al siaj disĉiploj, ke Li devas iri al Jerusalemo kaj multe suferi de pliaĝuloj, ĉefpastroj kaj leĝdoktoroj; ke Li estos mortigita, sed la trian tagon Li reviviĝos. Sed Petro Lin apartigis kaj komencis riproĉi Lin, dirante: "Dio malpermesu tion, Sinjoro! Tio neniam okazu al Vi!". Sed Jesuo turnis sin al Petro kaj diris: "Iru for de Mi, Satano! Vi estas malhelpo por Mi, ĉar vi parolas ne laŭ Dio, sed laŭ la homoj!".

Poste Jesuo diris al siaj disĉiploj: "Se iu volas iri post Mi, li abnegaciu sin, surpronu sian krucon kaj sekvu min. Ĉar tiu, kiu celas nur sian vivon, ĝin perdos; sed tiu, kiu estas preta oferi sian vivon pro Mi, tiu ĝin retrovos. Se iu akirus eĉ la tutan mondon, tamen li ruinigus sian vivon, kion li gajnus? Aŭ kion iu povas doni, por reakiri interŝanĝe sian vivon? La Filo de la homo revenos kun la gloro de Dio, la Patro, kune kun siaj anĝeloj. Tiam Li redonos al ĉiu rekompenco laŭ liaj faroj".

Al la disĉiploj, kiuj sekvas Jesuon opiniante ke li estas la triumfanta, venkanta mesio, tiu anoncita de la tradicio, kiu en Jerusalemo konkeros kaj ekprenos la povon, Jesuo por la unua fojo parolas malkaŝe pri tio, kio atendas lin en Jerusalemo.

Ni estas ĉe la ĉapitro 16 de la evangelio de Mateo, ekde versiklo 21. "En tiu tempo Jesuo komencis", tio signifas vicon da instruoj kiuj daŭras laŭlonge de la tuta vojo, "klarigi al siaj disĉiploj, ke Li devas...", la verbo devi estas faka verbo kiu indikas la Dian volon, "iri al Jerusalemo kaj multe suferi". Ĉi tiu verbo estas kreaĵo de la evangeliistoj, ĉar ĝi multe similas al la termino Pasko, ja la verbo suferi en la greka estas Pasĥo, kaj ĝi havas asonancon kun la termino Pasĥa, kiu signifas Paskon, ĉar la evangeliistoj vidis en Jesuo la veran paskan ŝafidon. "Multe suferi de pliaĝuloj, ĉefpastroj kaj leĝdoktoroj"; ili ĉiuj estas la membroj de la Sinedrio, la plej alta jura instanco de Israelo, "Li estos mortigita", Jesuo do ne iros konkeri la povon, sed li estos mortigita de la

havantoj de la religia povo. La plej altaj reprezentantoj de la religia institucio estos la mortigantoj de Jesuo. Sed li aldonas, "la trian tagon Li reviviĝos".

La trian tagon ne estas kronologia indiko, la nombro tri indikas tion, kio estas plena, kio estas kompleta, do li estos mortigita, sed li reviviĝos plene. Nu, tuj kiam Jesuo diris ĉi tion, Petro ekrolas. La evangeliisto prezentas Simonon nur per lia negativa kromnomo, faka termino per kiu Mateo indikas la kontraŭstaron, la kontraŭecon de ĉi tiu disĉiplo al tio, kion Jesuo anoncas.

"Petro Lin apartigis", do li ekkaptas Lin, kaj tuj kiam Jesuo komencis klarigi, Petro komencas sian reziston. "Kaj komencis riproĉi Lin", laŭvorte admoni, kaj ĝi estas la termino, kiun oni utiligas por forpeli la demonojn. Do laŭ Petro tio, kion Jesuo diris, ne kongruas kun la Dia volo, sed ĝi estas eĉ satana penso, diabla penso.

La versio tradukas per "Dio malpermesu tion", sed laŭvorte ĝi estas "Pardonu Vin", subkomprenante Dion. Temas pri esprimo, kiun oni utiligis por tiuj, kiuj estis forlasintaj Dion. Ĝi troviĝas ankaŭ ĉe profeto Jeremia, ĉapitro 5, versiklo 7. Do "Dio pardonu vin, Sinjoro! Tio neniam okazu al Vi!". Do laŭ Petro tio, kion Jesuo estas diranta, estas afero malproksima de Dio, tial Dio devas Lin pardoni, eĉ diabla penso.

"Sed Jesuo turnis sin al Petro kaj diris: "Iru for de Mi, Satano!". Ili estas la samaj vortoj, kiujn Jesuo utiligis en la dezerto por rifuzi la delogojn de la tentanto. Samkiel al la tentanto, al la diablo, Jesuo diras "Iru for", sed Jesuo ne rompas kun la disĉiplo, Li donas al li eblecon: "denove iru post mi".

Dum Petro estas antaŭe kaj volas montri la vojon, estas li la satano, la kontraŭulo. Tiam Jesuo diras: "Iru post Mi, Satano! Vi estas malhelpo por Mi". Tiu, kiun Jesuo estis difininta ŝtono taŭga por la konstruo de lia eklezio, tio estas, de la komunumo de la kredantoj kunvokitaj de la Sinjoro, tiu kiu estis vokita esti briko por la konstruado, nun fariĝas faliga ŝtono, skandale malhelpa ŝtono.

Kial? "Ĉar vi parolas ne laŭ Dio", nome laŭ la kategorioj de amo kaj de servado, "sed laŭ la homoj", nome la kategorioj de la povo kaj de la regado. Jesuo komprenas, ke ne nur Petro havas ĉi tiun pensmanieron, sed ankaŭ ĉiuj disĉiploj. Jen do ke li sin adresas al ĉiuj siaj ceteraj. "Poste Jesuo diris al siaj disĉiploj: «Se iu volas iri post Mi», Jesuo invitis Petron iri post Li, kaj nun Li komprenigas kiaj estas la kondiĉoj por ke oni povu sekvi Lin.

«Se iu volas iri post Mi, li abnegaciu sin», abnegacii sin ne signifas humiligi sian ekziston, sed rezigni ĉi tiujn pensojn pri ambicio, pri sukceso, pri superregado, kaj poste Li daŭrigas laŭvorte, «surprenu sian krucon». La kruco ne estas donata de Dio, sed ĝi estas surprrenata de la homoj. La evangeliisto utiligas la terminon "surpreni", kiu indikas la momenton kiam la kondamnito devis levi el la tero la turmentilon kaj ĝin surprreni sur siajn ŝultrojn. Poste de tie, de la juĝejo, li devis eliri el la pordegoj de la urbo por iri al la loko, kie li devis esti ekzekutata. Ĝi estis la momento plej terura, la momento de la soleco. La homamaso havis la religian devon insulti kaj bati tiun homon.

«Li surprrenu sian krucon», la kruco estis la mortopuno rezervita al la forĵetaĵoj de la socio. Do Jesuo ne estas parolanta pri suferoj kaj doloroj, sed li estas parolanta pri la skandalo kuntrenata de la sekvado de Jesuo, iu skandalo, kiu eĉ igas taksi forĵetaĵoj de la socio Jesuon kaj liajn sekvantojn, eĉ homoj forĵetitaj de Dio, ĉar la kruco estis la turmentego por la malbenitoj de Dio, «kaj sekvu min».

Jesuo do ne estas parolanta pri la morto per kruco, sed pri la vojo al la turmentego, soleca vojo, vojo de malhonoro. Se la disĉiploj ne estas pretaj perdi sian reputacion - ĉar pri tio temas - ili ne pensu sekvi Lin, ĉar sekvi Jesuon signifas iri renkonte al la plej granda malhonoro. "Ĉar tiu, kiu celas nur sian vivon, ĝin perdos; sed tiu, kiu estas preta oferi sian vivon pro Mi, tiu ĝin retrovos".

Kiu vivas por la aliaj plene realigas sian ekziston, kiu vivas ekskluzive alcentrita al siaj bezonoj, al siaj necesoj, tiu ĝin detruas. Ĉi tiu estas la alternativo proponata de Jesuo. Vivi por la aliaj, doni, ne estas perdo, sed gajno. Ĝi signifas plene realigi sin mem.

Kaj Jesuo komentas: «Se iu akirus eĉ la tutan mondon, tamen li ruinigus sian vivon, kion li gajnus?». Al kio utilas gajni multe, akiri multe, kaj poste perdi sin mem? Jen la signifo. Ĝi estas kritiko, kiun Jesuo faras al la potenculoj, al la havantoj de ĉia povo. La homoj kiuj konkeris la povon, forkonsumitaj de la ambicio, estas homoj kiuj havas multon, sed havas nenion, ĉar ili tute perdis sin mem.

Ili estas homoj drivantaj de la vivo, drivantaj de la feliĉo. «Ĉar la Filo de la homo», Filo de la homo indikas Jesuon en la pleneco de la Dia kondiĉo, «revenos kun la gloro de Dio, la Patro». Jesuo kontraŭmetas al la plej granda malhonoro, la mortopuno al kiu li estis kondamnita de la Sinedrio, do la plej granda malhonoro de la religia institucio, la plej grandan honoron fare de Dio.

Do «kun la gloro de Dio, la Patro kune kun siaj anĝeloj». Kaj ĉi tie Jesuo citas la libron de Sentencoj, ĉapitro 24, versiklo 12, «Tiam Li redonos al ĉiu rekompenco laŭ liaj faroj», laŭvorte "la praktikado". La homo estas taksata laŭ la vivo kiun li praktikis, laŭ la faroj kiujn li plenumis, kaj ne laŭ la ideoj aŭ la religiaj instruoj kiujn li deklaris: estas tio, kion oni faras por la aliaj, tio kio determinas propran ekziston.

Estas kroma parto, kiu ne ĉeestas en la liturgia versio, sed kiu estas grava. Jesuo anoncas, ke «la ĉi tie starantaj ne mortos antaŭ ol ili vidos la Filon de homo venantan en sia regno». Fakte li anoncas la epizodon kiu sekvas tuj poste, tiun de la transfiguriĝo, en kiu Jesuo pruvas ke la morto ne detruas la personon, sed ĝin plene potencigas.